2.ª JARO N.º 11 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 APRILO 1937


# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)


## LUDO DE KRUELA FARSO

Sub nebulo de Londono, ekstariĝis internacia komitato por zorgi ke la solvo de la hispana milito estu afero nur de hispanoj. Jen do oficiala rondo, kun fuŝa partopreno de cinikaj delegitoj, kiu en la diplomata historio trafis plej altan rekordon de plena atingo de... la mala celo!

Aperas troe la pruvoj pri la fakto ke la ribelintaj generaloj, sub patosa masko de «hispanismo», estas nur obeemaj k humilaj pulĉineloj, kies fadenoj dependas de la fremdaj fingroj de tiuj despotoj, kiuj sklavigas la popolojn de Germanio k Italio; tiu vero ne estis baro en la stranga konsisto de la grava komitato, kiu fondita, almenaŭ ŝajne, por eviti eksterajn intervenojn en la intimaj aferoj de Hispanio, entenis mirinde siajn proprajn sabotistojn.

La faŝistaj ŝtatoj plenumas lojale la malplenumon de siaj kompromisoj, laŭ nova tuteca koncepto pri solena subskribo k honora promeso en traktatoj k akordoj. En la komenco, la fama komitato unuanime decidis la ne-intervenon de fremdaj elementoj en la konflikto. Germanio k Italio akceptis la akordon; sed ili, fidelaj al siaj specialaj normoj, male ne-intervenis per abunda livero de moderna materialo k amasa ekspedo, al ribelintoj, de soldatoj—miloj k miloj—laŭ regulaj divizioj kun ĉiuj necesaj teknikistoj. Dume la naiva aŭ falsa konscienco de la demokratoj strute restis trankvila!

Kun duono da spleno plus duono da friponeco, tra la nuba vualo de Londono, la komitato rigardis la suferojn de nobla popolo, kun enuo de ĥirurgo aŭ kun ĝuaĉo de murdisto kiam enigas klingon de tranĉilo en la karnon de vivanto... La popola opinio internacia flaris la signifon de nia lukto; venis al Hispanio, dise k per propra risko, veraj volontuloj, bonaj amikoj de la justo k libero, por lukti apud legitima registaro; tial la komitato decidis formale malpermesi la eniron de volontuloj. Kun serioza mieno, la servistoj de Mussolini k Hitler, en tiu diplomata farso, subskribis la akordon kies aplikon oni fiksis por la 20. de Februaro. Post tiu dato rigore ĉesis la veno de internaciaj laboristoj por defendi liberon kontraŭ despotismo, sed floris la eniro, tra ribela zono, de italaj regimentoj por rabi pecojn de nacia teritorio. Tamen oni devas sincere konfesi, ke la faŝistoj, en ĉi tiu okazo, ne kraĉis sur sian subskriban signon, ne!, la akordo temis nur pri volontuloj k certe ne pri devigaj soldatoj...

Denove la komitato, kun embrio jam de miro, konstatis ke la hispana popolo, anstataŭ ol morti pro ĝiaj medikamentoj, ankoraŭ havis buŝon por laŭte denunci la trompon k... pugnojn por venkobati la invadintojn en ebenaj kampoj de Guadalajara. Nova turno de premilo al nia gorĝo estis la fia ideo, laŭ tre makiavela sugesto, proponi konfiski aŭ senvalorigi la riĉan provizon de oro, flava metalo, sub aĉa preteksto, ke la legitima trezoro de la nacio—frukto, el la ŝvito de kelkaj generacioj, kiun nun la legitima registaro devige ekmovas por defendi ĉifitajn rajtojn—apartenas al ĉiuj hispanoj Jes! tiu financa bazo, unuan fojon, estas je la servo de la hispanoj, kiuj kreis ĝin per laboro k sufero. La kruelaj ribelintoj ne povis rabi nian kuraĝon nek povis kapti la ŝtatan trezoron; nun iliaj advokatoj pretendas ja stulte eviti la potencon, kiun la kapitalistoj mem ĵaluze donis al tiu minerala flavaĵo.

En frenezo de furiozeco pro heroa defendo de Madrido, kiu aroge stabilas nevenkebla, la faŝismo perdas bridojn de prudento. La batoj en la milita fronto, fortiras la kurtenon de la komitata farso. Nude aperas, antaŭ la publiko, la misteroj de la kunsida tablo, kiu, sen brilo de veluro, estas nur malbela lignaĵo por saltoj de histriono aŭ por ludoj de mallerta ĵonglisto. Delegito de la «cezaro» parkeris, ke la faŝistaj «volontuloj» ne eliros de Hispanio pli frue ol post la venko de la «nacia» armeo! Tiu provokema deklaro ne estas jam kraĉo kontraŭ subskribon sed fulma ŝtormo en la malseka atmosfero de Londono, kiu eble bezonas flari hejme la haladzon de basaj fruktoj por veke k eke malfermi la palpebrojn.

Hipokrita ludo de farso povas esti reala sperto de tragedio!

## MELODIO DE PRINTEMPO

La tempo, indiferenta al homaj konfliktoj, en daŭra senhalta turnado, disvolvas, dum fajras milito, la gajajn kolorojn de floroj k herboj de sia nun ĵusa printempa sezono.

En la frontoj de la libereco, la bravaj soldatoj de nia Popola Armeo jam perceptas la favorajn ŝanĝojn de vetero per la milda kareso de varmeta vento, kiu anstataŭas la frostajn uraganojn aŭ la ŝtormajn muĝojn de la vintro. Zigzagas tranĉeoj tra kampoj ebenaj, pompe verdiĝintaj kun helaj vegetaj juveloj de floretoj modestaj. Rampas parapetoj grimpante supren al montoj imponaj, majestaj k altaj, kie la timiano, kun la rosmareno aŭ kun la lavendo, parfumas la aeron, kiu portas ŝvebe la sekan k akran odoron de nigra pulvoro, kun stranga simfonio de veoj ĝemantaj k himnoj arogaj, en apoteoza mikso, kiam siblas kugloj k ton-



dras eksplodoj de obusoj, laŭ furioza konkuro inter la kruela vintro, kiu reakcie volas eternigi neĝojn k la vigla socia printempo, kiu obstine luktas por fekunde varmigi la facon de l' mondo atendante ŝur ĝin tre riĉan tapiŝon el rozoj k diantoj...

Ankaŭ, tra la vejnoj de la korpo, kuras flue dum printempo nova sango kun forta oksigeno, kiu ĵetas eksteren, tra poroj de l' haŭto, malpurajn humorojn. Balailo de mikroboj estas do la ĉarma sezono de la belaj floroj k tiu nova freŝa likvoro, ruĝa kiel papavo, de la homa viviganta suko incitanta tikle amon k volupton!

La faŝismo estas tumoro, kiun jam kuracas ofensive la hispana popolo, oferanta nunjare la brilon de amuzaj festoj k la ĝojon de viglaj dancoj, pro deviga sorto k alta honoro batali sufere por donaci pacon k eviti sklavecon al tuta cetera homaro. Solena devas esti, eĉ kun funebra nuanco, la takto de nia printempa melodio. Tamen, Hispanio, kiu scias kuraĝe elteni fizikajn turmentojn, rigardante pereon de sia junularo k la detruon de siaj monumentoj k muzeoj sed ankaŭ haltigante, unuan fojon en Eŭropo, la paŝojn de la apaĉo internacia, tute ne povas eviti, nun mem, la evoluon de la naturo, kiu trudas fatale, sed ho, kiel mirinde! la burĝonojn de la arboj k la florojn de citronoj k oranĝoj en parkoj aŭ en ĝardenoj, kie dum la nokto regas, en potenca sensualismo, diskretaj petaloj de jasmeno.

ILI KAJ NI!

# DU MILITAJ METODOJ

Kvankam ne jam aktualaj, jen du raportoj prezentantaj du malsamajn kondutojn en milito. Ni esperas, ke nia legantaro eltiros adekvatan konkludon. Niavice, ni flankenlasas pluan antaŭparolon ĉar la faktoj parolas sufiĉe laŭte per si mem.

S-ro. Edmond L. Taylor, prezidanto de la «Asocio de anglaj k amerikaj Ĵurnalistoj en Eŭropo» korespondanto de «The Chicago Tribune» sin turnis parole al aŭdantaro de Parizo, komence de Novembro, kun jena raporto, kiun ni ekstraktas.

«Mi volas konstatigi, ke nenia doktrina antaŭjuĝo influas miajn vortojn. Mi ne estas socialisto, mi ne estas eĉ liberalulo k mi ne estas certa pri tio, ĉu mi estas demokrato. Mi ne scias, kio mi ĝuste estas, sed mi deklaras, ke mi ne indignas nek surpriziĝas se oni nomas min «faŝisto». Krom tio, mi hazarde estas katoliko, ne tre aktiva sed katoliko. Ne ekzistas ia ajn persona kontraŭeco inter la hispanaj ribeluloj k mi. Tamen, mi pensas k kredas, ke **la soldatoj de Franko estas furiozaj hundaĉoj.**

Mi tute ne povas aprobi la konduton de tiuj, kiuj agas kiel sovaĝaj bestoj k sin turnas al tutmondo proklamante sin Pioniroj de la okcidenta kristana Civilizo.»

Post tio, S-ro. Taylor, kiu estis akompananta la militan kolonon de Yagüe k tiun de generalo Varela el Ekstremaduro ĝis la ĉirkaŭaĵoj de Madrido, kiam la registaranoj malhavis organizon k militajn ilojn, rakontis la terurajn scenojn, kiujn li mem vidis. Li priskribis amasajn fusilmortigojn, ŝtelojn k rabojn, sennombrajn atencojn al ĉiu homa rajto. Li parolis pri tiu religiema sinjorino, kiu en Talavera petis de la ribela komandanto permeson por enviciĝi ĉe la taĉmentoj da ekzekutistoj «ĉar tiu okupo plaĉis al ŝi» k pri kies deziro oni konsentis. Li rakontis la masakron al vico da kaptitoj en Toledo, **unu el kiuj malhavis jam sian kapon** k spite tiun kripligon li restis kunligita al siaj malfeliĉaj kunuloj. Ili estis dudek kvar. Poste li vidis aliajn kvindek pafmortigitojn, kuŝantaj kun la vizaĝoj kontraŭ la tero.»

Ankaŭ li raportis pri la buĉado en la Hospitalo de Sankta Johano en la sama urbo, dirante kiel la legianoj murdadis tie per bajoneto ĉiujn vunditajn respublikanojn.

Mi konvinkiĝis—diris S-ro Taylor —ke jam pereis en tiu milito duona miliono da hispanoj. La plejmulto el ili mortis kontraŭ la ekzekuta muro. Ne temas nur pri militkaptitoj. Ĉiutage en Burgos k en ĉiuj urboj regataj de la ribelintoj, oni arestas homojn, kun indiferento pri sekso, akuzataj esti iam aliĝintaj la maldekstrajn partiojn k ĉiunokte ili estas mortigataj kiel hundoj Franko ne povas venki sen teroro. Ankaŭ li ne povas sukcesi sen la kunhelpo de la trupoj de maŭroj k de la fremda faŝismo; ne pro tio, ke iliaj kontraŭstarantoj posedas bonegan armeon, ĉar lojalaj soldatoj estas tute simple volontuloj, sed pro tio ke la popolamaso malamas la tiranojn sub la flago de faŝismo.»

Badajoz, Talavera, Toledo, Malago! Tiel parolis tiu eksterlanda gazetisto, akompaninto de la ribela armeo en ĝia triumfa marŝo ĝis la halto antaŭ la sojlo de Madrido.

Samtempe, fine de Oktobro, la registaranoj atakis Oviedon. Estis la samaj tagoj, dum la fasistoj kruele k aroge jam estis apud Madrido, kiam la bravaj milicanoj, sentimaj malgraŭ sia maltaŭga armilaro k manko de municio, atakadis la nordan urbon arde k kuraĝe. Tiam la atako malsukcesis, antaŭ la ĝustatempa alveno de faŝistaj kolonoj perfekte ekipitaj el Galizio... Sed la milicanoj ne nur rezistis, sed eltenis la sieĝon. Nun la lojalaj armeanoj ree ekpenetras la urbon k estas oportune publikigi unu el la proklamoj, kiuj tiuokaze estis dissendataj, kies teksto estas jena.

**«AL LA ARMEO DE ASTURIO!**

Hodiaŭ vi elpaŝos la triumfan vojon, kiun vi laŭiros kun la aliaj korpusoj de la Norda Armeo.

Nian venkon ni valorigu per la plej skrupulaj procedoj k digno. Ni iras liberigi Oviedon, ne ĝin sangoplenigi nek detrui. Post ni, alvenos la popola justeco k nur ĝi juĝos k aplikos la necesan punon. Tiu agmaniero, kiun postulas de vi la militista disciplino, propravole akceptita, estas deviga kun pli da forto, pro la nobla humana enhavo de viaj politikaj k sociaj doktrinoj, pro kiuj vi batalas k pro kiuj tiom da kamaradoj mortis. Ni ne luktas por efektivigi venĝon. Ni mortas, se necese, por atingi venkon, kiu ebligos al ni starigi la morgaŭon sur pli justa bazo.

Ju pli ni povos montri pura nian triumfon al la rigardoj de la mondo, des pli grava ĝi estos. Homoj de Asturio, popolaj milicanoj! Pro via senmakula historio, pro la memoro de la kamaradoj falintaj dum Oktobro en la jaro 1934, ekstarantaj hodiaŭ en siaj tomboj por ĉeesti la malnovan epopeon, fiere vidante la frukton de sia heroeca sinofero; pro ĉio, kio vi reprezentas, vi ne povas ne plenumi la esperojn, kiujn oni havas je vi.

Vi estas por la mondo la ministoj de Asturio. Nenia diferenco estas inter vi. Al ĉiuj ni nin turnas kun la peto, k ni tion esperas, ke vi faros la definitivan klopodon, kiu kondukos nin al la venko k al la gloro.»

Ĉiu agas laŭ sia naturo. La faŝistoj agas faŝiste. La antifaŝistoj ne povus agi sammaniere ĉar iliaj principoj estas malsamaj. Malsamaj, sekve, estas iliaj procedoj en milito k dum rekonstruado en la paco.



**La improvisitaj armitaj grupoj da milicanoj, en la unuaj momentoj de la ribelo, transformiĝis jam en normalaj regimentoj de kuraĝaj soldatoj. Jen parado de la nova Popola Armeo**

**Devizo jam aktuala: floru tutmonde la Popola Fronto Esperantista!**

# OFICIALA PROTESTO



K-do. Alvarez del Vayo aŭ la voĉo de Hispanio

## DUM POPOLO BATALAS POR EFIKA DEFENDO DE SIA GRUNDO, ESTAS BONA KOMPLEMENTO, KANCELARIA PROTESTO, PRO ITALA INVADO, POR SENMASKIGO DE FRIPONOJ

La hispana ministro pri eksteraj aferoj sendis oficiale k denunce, je nomo de nia profanita lando, jenan noton al sekretario de la Ligo de Nacioj:

«La deklaroj de italaj oficiroj k soldatoj kaptitaj dum lastaj pasintaj tagoj en sektoro Guadalajara, nediskuteble konfirmis la partoprenon de regulaj unuoj de itala armeo, senditaj por batali sur hispana teritorio, en malobeo de artikolo 10ª de la Pakto, laŭ kiu «la membroj de la Ligo sin devigas respekti k subteni, kontraŭ ĉia ekstera atako, la teritorian integron k la politikan sendependecon de ĉiuj membroj de la Ligo».

El tiuj deklaroj, faritaj antaŭ hispanaj aŭtoritatoj, oni konstatas jenon: La 6. Februaro k sekvantaj tagoj elŝipiĝis en haveno Kadiz el itala ŝipo Sicilia k aliaj, multenombraj italaj trupoj, tute armitaj k ekipitaj. Ili estis koncentrigitaj en Puerto de Santa Maria k poste transportitaj al fronto en Guadalajara por komenci nunan ofensivon. Ĝin realigas kvar divizioj, nome: la unua, dua k tria divizioj de «nigraj ĉemizoj» komandita de generalo Nuvoloni, kiu postenas en Brihuega k la unua divizio «Littoria» komandata de generalo Bergonzoli, kies komanda loko estas Almadrones. Tiun korpuson estras generalo Manzini, kiu deĵoras en Algora. La atakantaj fortoj estas kompletigataj per du specialaj brigadoj, unu konsistanta el regulaj italaj k germanaj soldatoj k alia, kiu konsistas el germanaj soldatoj k kvar rotoj de *carabinieri* motorigitaj. Ĉiu divizio havas du regimentojn de tri batalionoj kun 650 soldatoj k konsistas el kvar rotoj, tri de fusiloj k alia de mitraliloj «Fiat». Ĉiu regimento havas grupon de rapidaj kanonetoj de 45, alian de 65'17, alian de 75'27 k alian de 100'17, ĉiuj grupoj de tri baterioj kun kvar kanonoj instalitaj sur aŭtomobiloj k traktoroj; baterio antiaera de 20 mm. k 260 pafoj po minuto; bataliono de 50 tankoj provizitaj de mitraliloj «Fiat», de antitankaj mitraliloj de 8 k aliaj de kanonoj de 47; roto de gasoj k flamĵetiloj, fajristoj, brankardistoj k radiotelegrafistoj. Ĉiuj divizioj estas motorigitaj. Ĉiu bataliono havas 70 ŝarĝaŭtomobilojn krom la koncerna rezervo. Inter tiuj batalionoj troviĝas jenaj: 500, 624, 824, 835 k 840. La aeraj fortoj konsistas el tri eskadroj germanaj k kvar italaj; ĉiu eskadro havas dekdu aeroplanojn. La italaj aviadiloj estas de la markoj «Fiat», «Savoia» k «Romeo». Estas tuj alvenontaj du aliaj italaj divizioj. La supera komandantaro celas kapti Madridon dum itala k germana eskadroj, sub preteksto de marborda kontrolo, atakos Barcelono k Valencio.

Tiuj estas la deklaroj faritaj de Antonio Luciano, aktiva komandanto de regula itala armeo, estro de mitraliloj de la unua divizio «Littoria»; Achilles Sacchi, leŭtenanto de itala armeo, de la tria divizio de «nigraj ĉemizoj»; Giuseppe Moretti, de unua roto de bataliono 835; Andrea Cappone, de bataliono de kanonetoj 835; Francesco Lodo, fusilisto de bataliono 835; Giuseppe Rossetto, de dua roto de bataliono 624, k. t. p.

Tiaj faktoj konsistigas atakon al «la teritoria integro k politika sendependeco» de Hispanio k montras serion de plenumitaj faktoj, kiuj reproduktas kun kreskanta danĝero, la situaciojn kontraŭajn al internacia juro, kiujn kreis lastatempe la faŝistaj ŝtatoj. Tio ankaŭ kreas apelacion al milito sen antaŭa deklaro, nova k danĝera sistemo denuncata de la reprezentanto de Hispanio antaŭ la Kunveno de septembra monato.

La Registaro de la Respubliko konsideras, ke ekde la starigo de la Ligo de Nacioj, neniam okazis en eŭropa kontinento tiom skandale grava perfido al ĉies internaciaj devoj; k per la sama lojala spirito al tiu institucio, kiu pravigis en Decembro la peton pri eksterordinara kunsido de la Konsilantaro por denunci situacion «kapabla danĝerigi la internaciajn rilatojn k minaci la pacon», hodiaŭ sciigas al Via Ekscelenco tiajn faktojn, kun peto urĝe komuniki ilin al ĉiuj ŝtatoj membroj de la Ligo.

Julio ALVAREZ DEL VAYO

# FRANCIO EN LA VICO...

La faŝista manifestacio de Clichy, kiu motivigis surstratan proteston de franca Popola Fronto, transformita en publika batalo, kun pli ol kvardek vunditoj k kelkaj mortigitoj, montras ke densa pulvejo, manipulita de Faŝismo, fakte ekzistas ankaŭ en Francio.

Ĉio havas internacian rilaton en ĉi tiu tragedia k konvulsia stertoro de la faŝismo. La universalaj gvidistoj de ĉi tiu abomena teorio – Romo k Berlino kiel akso—, kiam komprenis, ke Madrido ne estas konkerebla, komencis agiti siajn kunkulpulojn de Francio, unuiĝintaj en la vicoj de la malaperintaj «fajraj krucoj» de La Rocque, hodiaŭ kun la etikedo de la Franca Socia Partio.

De la ekapero de nia gazeto, ni estas avertante al ĉiulandaj proletoj, ke nia batalo ne estas nacia, ke iliaj politikaj interesoj en ĉi tiuj momentoj estas ligitaj al la niaj, ke la malamikoj de la libero k de la progreso ne haltos en la Pirineoj. Sed, bedaŭrinde, la francaj politikistoj montriĝis en ĉi tiu okazo surdaj k mutaj rilate al Hispanio. Kaj ne nur rilate al liberala k revolucia Hispanio sed eĉ rilate al la propra Francio, kiel montras la okazintaĵoj.

Francio ne aŭdis la alarmajn kriojn de Hispanio. Ĉu ĝi aŭdos nun la pafojn de Clichy? ĉu scios ĝi taksi la signifon de tiu sanga prologo? La nuna Francio, kiel la brava Hispanio de Julio 1936, havas interne de sia propra hejmo k interne de la plej fundamentaj organoj de la nacio, siajn malamikojn. Tie, kiel ĉi tie, ekzistas subaĉetita gazetaro je la servo de Germanio k de Italio; tie, kiel ĉi tie, ekzistas ŝtatoficistoj je la servo de la faŝismo; tie, kiel ĉi tie, ekzistas sub masko de religio, ruza pastraro je la servo de la reakcio; tie, kiel ĉi tie, ekzistas granda despota burĝaro malamika de la laboristaro, k, fine, ĉi tie kiel tie, ekzistas ankaŭ subfosita armeo je la servo de la tiranio...

Ni atendas la reagon de la demokrata Francio antaŭ la gravaj okazintaĵoj de Clichy. Sed ni atendas sen ia espero... Nur la sinteno de la proletaro povus esti decida en ĉi tiuj danĝeraj momentoj. Pro tio ni aplaŭdas la deklaron de la duontaga striko k la postulon pri likvido de la faŝistaj ligoj. Sed ni atendas ankoraŭ pli gravaj k energiajn decidojn fare de tiuj, kiuj verkis la plej brilajn paĝojn en la historio de la progresema homaro!

Preskaŭ groteskaj epizodoj okazis en Hispanio, kiel anonco de la nuna tragedia milito. Malmultaj respondecaj gvidantoj sciis taksi la minacon. Ke la averto de Clichy ne estu vana alarmo!

# SANKTA HISPANIO!

Estas necese aparteni al iu registaro por ĝuste kompreni kiom malfacile estis por ni, socialistoj, montri nian aliĝon al la politiko de «ne-interveno». En Belgio, Svedio, Norvegio k Ĉeĥoslovakio, ministro pri eksteraj aferoj, eĉ se li estas socialisto, havas preparitan respondon, kiam oni riproĉas al li pri neŭtraleco rilate al konflikto inter amika registaro k militista ribelo.—«Kion vi deziras? kion ni povas fari? ĉu estas ni solaj kiuj devas esti helpemaj? Estas la registaro de franca Popola Fronto, kiu havis la iniciativon. Ĉiuj grandaj potencoj, Sovetio inkluzive, estas aliĝintaj al tiu akordo».

«Hispanio, Hispanio!» Tiu estas la titolo de la verko de Jean Richard Bloch, eble la verko plej agrabla, kiun oni kreis pri la kalvario de hispana popolo. La aŭtoro klarigas kiaj estas la influoj, kiuj decidigis hispanan registaron aĉeti en Francio armilojn k municion; kiel Francio decidis, la 7. Aŭgusto, antaŭ ol aliaj landoj, la embargon de milita materialo destinita al Hispanio. Oni povas skribi, retrospektive, longan epilogon pri la decido, en tiu aspekto, kiu rilatas al riskoj de milito, kiel natura sekvo de malsaĝa sinteno.

Miaflanke, mi tute estas konvinkita, same ol Richard Bloch, ke danĝero pri milito estus nula se franca registaro estus atendinta almenaŭ, antaŭ la starigo de malpermeso pri sendo de armiloj k municio, ke la aliaj landoj estus alprenintaj similajn decidojn kun efektiva plenumado. Sed en nunaj momentoj estas senutilaj la diskutoj pri tiu afero. Kio nun estas interesa, certe ne estas scii du decas politiko de ne interveno, sed scii se oni povas ĝin subteni, post apero de certaj faktoj.

Malago falis, k anglaj ĵurnaloj diris, ke temas pri itala venko. La heroaj milicoj defendas Madridon kontraŭ atakoj de dungita armeo, konsistanta el maŭroj k germanoj, sed ne el hispanoj tiu fremda soldataro klopodas formi sieĝon. Miloj da faŝistoj alvenas ĉiusemajne en hispanajn havenojn. Kaj dume, en Londono, la diplomatoj misuzas la tempon per senfruktaj vortoj, en kiuj moleco k malvarmo kuniĝas kun malŝato pri rajto k leĝo. Tiu spektaklo provokis kriojn de ribelo k naŭzo en laboristaj medioj; en ĉiuj landoj, kie oni amas Hispanion, oni suferas pro ĝi; ili fariĝas solidaraj al tiu brava lando ne nur pro komunaj sentoj k ideoj sed ankaŭ pro klara antaŭvido de estontaj rezultoj, koncerne al ceteraj liberaj landoj de Eŭropo, se internacia faŝismo venkus fanfarone preter la Pirineoj.

Ĉie ripetiĝas sama demando: «—Ĉu tio daŭros ankoraŭ multe da tempo? Kiam ĉesigos Anglio k Francio tiujn vanajn diplomataĵojn, kiujn profitas faŝistoj per sendado de soldatoj al hispanaj havenoj, ĝis atingo de sufiĉa kvanto permesanta forlason de novaj sendoj?».

Nia amiko Camille Hujsmans, prezidanto de belga parlamento, kiu—kune kun aliaj socialistoj—ĵus vojaĝis inkognite tra Hispanio, revenis kun la firma konvinko ke kontraŭ la nefleksebla rezistado de tuta popolo hispana al fremda invado, la forkoj de faŝista infero ne venkos; sed se oni permesas la intervenon de Germanio k Italio, la demokrataj registaroj akiros la respondecon pri senfina plilongigo de tiu terura milito, kiel okazis en Rusio dum jaro 1918, kiam la fremda interveno ne donis la venkon al Koltchak k Denikin, sed prokrastigis dum kelkaj monatoj ilian finan malvenkon.


En Belgio, kiel en Francio, kie la ŝtatestroj ĉiel defendas la politikon de ne interveno k tio nur «por la bono de la patrio» ofte oni asertas ke, la demokrataj registaroj nur havas jenan alternativon: la ne interveno aŭ la perforta interveno, kiu iniciatus, tere, mare k aere, militon inter la eŭropaj faŝistaj k antifaŝistaj potencoj.

Sed tiu milita interveno—laŭ inversa senco sed per samaj rimedoj ol dum tempoj de la nomata «Restarigo» —ne estas, kion petas niaj hispanaj amikoj. Ili simple deziras ke oni ne liveru ilin, kun manoj ligitaj, al krimaj intencoj de la internacia faŝismo.

Tial oni devas esperi, ke potencoj kiel Anglio k Francio, kiuj havas—pli ol Sovetio—la sorton de Hispanio en siaj manoj, decidos elmeti al faŝistoj jenan dilemon: aŭ ili akceptas tuj efikan kontrolon rilate al «volontuloj» k al materialo, aŭ oni redonos al hispanaj amikoj la liberon ricevi helpon, per soldatoj k materialo senditaj al legitima registaro, kiu ĝismorte luktas kontraŭ perfidaj ribeluloj k fanatikaj frenezuloj.

Sed inter tiuj ekstremoj ne estas io kroma: unu aŭ alia! se ili ne findecidas k daŭre dubas, la demokratioj meritos la severan juĝon de Sankta Paŭlo: «Via frato, nuda k vundita, petis al vi helpon k vi ne atentis lin; vi lin mortigis».

Emilo VANDERVELDE




Estingante la incendion per gazolino kun petrolo

## NIGRA BILANCO

Laŭ oficialaj informoj, kiujn ĵus aperigis la konsilantaro de Madrido, de la 7. de Novembro ĝis 15. de Marto, la aviadiloj k la obusoj faŝistaj detruis, tute aŭ parte, en la interno de la urbo, naŭcent okdek domojn; el ili dek kvar lernejoj, ok preĝejoj, naŭ aziloj por maljunuloj k infanoj, kvar hospitaloj, du muzeoj k la ejoj de Akademioj de la Historio k de la Lingvo.

En la bilanco, pri viktimoj pro faŝista bombardado, la tuta sumo atingas jenajn ciferojn: 907 mortintoj subitaj kun 2.809 vunditoj. El ĉi tiuj mortis poste 370. Plie oni mencias 430 malaperintoj.

Unu el plej belaj kvartaloj estas plene fordetruita. En la antaŭa statistiko, oni ne kalkulas la centojn da modestaj loĝejoj renversitaj en la apudaj antaŭurboj kie falis 214 mortintoj k 693 vunditoj pro aeraj atakoj al tiuj laboristaj zonoj. Jen la promesita feliĉo!

**La sendependeco de Hispanio estas nun liberiga faktoro internacia!**

POPOLFRONTA VIDPUNKTO

# KLASBATALO KAJ DEMOKRATIO

**La voĉo de nia bulteno naskis vigle laŭtan eĥon en Esperantio. Tre ofte ni ricevas tiklajn demandojn pri nia situo inter klasbatalo k demokratio. Ni tial volas fari kelkajn konsiderojn k submeti ilin je la ekzameno de nia legantaro.**

Agnoskinte la ekziston de la klasbatalo, kiel logikan sekvon de kapitalista socio, dika kerno de la afero kuŝas en la demando, ĉu eblas mildigi ĝiajn akraĵojn per evoluaj procedoj—t. e. per leĝoj celantaj plibonigi la vivkondiĉojn de la laboristaro, kun kreskanta damaĝo por la privataj interesoj de la posedanta klaso—aŭ ĉu la sola elirvojo, por ordigi la mondan ĥaoson, estas perforta proleta revolucio seniganta abrupte la ekspluatantojn je iliaj privilegioj. Komprenenble, la demokratoj daŭre k obstine kredas, ke sufiĉas vera demokratio por aranĝi, iom post iom, pli bonan situacion. Aliflanke, la revoluciuloj asertas persiste, ke nur profunda amasa ribeliĝo, renversanta la fundamenton de la socio, kapablas solvi la problemon. Ĉar en la mondo ĉio estas relativa; niaopinie, ambaŭ tezoj ĝustas parte k ankaŭ parte malpravas. Ni provos klarigi nian penson tiurilate.

La demokratoj devus atenti la fakton—kiun la klasbatalanoj siaflanke devus ne malatenti—ke teorioj fiaskas antaŭ la realaj eventoj nuntempaj. Hodiaŭ nur valoras la praktika sperto kun la sufiĉa kapablo percepti, ke sur la scenejo de la mondo aperis nova metodo, kun lerta ŝajno de emfaza doktrino, heroeca k mistika, por la intimaj sentoj de ĝenerala homo; nova faktoro de kruela politika perfortigo: Faŝismo!

Kiam, el la cerbo de filozofoj k saĝuloj, fluadis diversaj sociaj programoj, por gaja stato k nobla feliĉo de la Homaro, tio, poste sin nomanta «faŝismo», kuŝis en densa mallumo. Neniu povis tiam antaŭvidi ĝin aŭ anticipi ĝian danĝeran k teruran ŝprucadon. Fakte—ni ne diskutu—faŝismo estas nova aspekto, nova taktiko, pli «scienca» k pli efika por la nuna tempo, de malnova sistemo: la kapitalismo! Se oni akceptas, ke ĝi adoptis maskon k novajn batalilojn, ni neniel devas resti naive katenigataj al niaj ĉiamaj, ŝablonaj, apartaj programoj de partioj, sindikatoj aŭ organizoj kun multaj kvereloj inter si, tro ofte nur pro simplaj eksteraj detaloj. Ni uzu ankaŭ novajn procedojn por lukti kontraŭ la moderna armilo de la eterna malamiko, forjetante disputojn k masive unuigante komunajn k parencajn fortojn!

La afero statas tiel, kun sama valoro, inter antaŭenemaj homoj. La ununura diferenco estas, ke la demokratoj aljuĝas al evoluado absolutan efikon, dum la revoluciuloj fidas nur al revolucia agado la ŝanĝon de la universala panoramo je alia pli justa sociordo. Nun, kiam la faŝismo ekspluatas ruze nian disdividiĝon por pli facile sukcesi, estas do afero de instinkta singardemo la alianco de la proletaro kun la mezaj tavoloj por alfronti la komunan danĝeron de subita atako, venkobati ĝin k libere marŝi pluen al reala efektiviĝo de songoj k revoj.

Ĉu demokratio? ĉu klasbatalo?: Unueco antifaŝistal ni estas firme certaj pri la fakto, ke la kunfandiĝo de la laboristoj kun la liberalaj intelektuloj sen forgeso pri la progresemaj, kvankam hezitemaj, etburĝoj en ampleksa Popola Fronto, favoras la kontraŭfaŝisman lukton, per forpreno de grundo al malamikaj radikoj. Se oni ne priatentas tiun ĉi nekontesteblan veron, oni riskas, ke tiuj mezklasanoj, pro dubo, timo aŭ konfuzo, naturaj en sia medio, estu varbataj de la faŝismo, kiu provas logi ilin per ĉiuj demagogiaj k impresaj rimedoj. Tamen ilia propra intereso puŝas ilin iri apud la proleta klaso, kun kiu ili havas komunan senton de libero k homa digno en sama naŭzo al faŝismo, moderna instrumento politika de ekstrema tiranio. Popola Fronto estas ja, en ĉiu lando, paŝo antaŭen en la vojo de klasbatalo laŭ praktika metodo.

Nur blindaj dogmemuloj rajtas ne kompreni la aperon de tiuj sociaj fenomenoj en la aktuala situacio. Krome, la teorio pri dividiĝo de la homoj en du solaj klasoj ricevis, laŭlonge de la tempo, fortan skuon. Se ni konsideras la ekziston de grandnombra klaso, kiu staras en la mezo—k objektiva rigardo pruvas, ke tiel okazas—estas konvene, profite k interese fari solidan ligon kun tiu homa grupego, anstataŭ permesi stulte ke ĝi, erare sed fakte, kuru al la putraj vicoj de la faŝismo.

La temo estas pri vivo aŭ morto. En milita periodo neniu homo, ĉu proleto ĉu demokrato povas rifuzi sian lojalan aliĝon k fidelan subtenon al potenca Popola Fronto, kies estarigo k plifortigo, sen forlaso, eĉ kun ĝentila respekto, pri apartaj programoj k doktrinoj, estas necesa kondiĉo k garantio de grandioza venko kontraŭ la abomena monstraĉo, kiu hodiaŭ ne vante babilas sed freneze atakas k furioze murdas...

Kunigi ĉies fortojn, jen estas la nuna devo de ĉiu konscia antifaŝisto—klara unuiga vorto—laŭ postulo de la cirkonstancoj. Kontraŭstari, per teoriaj subtilaĵoj, la plenumon de tiu urĝa bezono estus danĝera fanatikemo aŭ balainda mallerteco, ĉiam malfacila baro por plej decida ŝtupo en la suprenironta marŝo al vivo sen sufero. La propra sperto, por ni, estas instruo



Frederika Montseny, ministro de Saneco k Socia Interhelpo; ŝi apartenas al sindikata organizo C. N. T. k estas la unua virino, en Hispanio, kiu okupas postenon de ministro.

# EPIZODOJ EL LA FRONTO

En Madrido, kiam faŝista armeo estis jam tuj atakonta la ĉefurbon, oni urĝe alvokis la laboristajn organizojn al rekrutigo de bezonataj miloj da defendantoj.

Amase alfluis laboristoj, kiuj pretiĝis al batalo kontraŭ la ribeluloj, sed ĉar ne estis sufiĉe da armiloj por ĉiuj, oni elektis tiujn fizike plej taŭgajn soldatojn. Entuziasme ili tuj ekmarŝis al frontaj tranĉeoj k tiam oni rimarkis, ke malantaŭ tiu taĉmento kunmarŝis, en amasa grupo, granda kvanto da laboristoj sen armiloj. Ili estis la ĵus rifuzitaj volontuloj.

Kelkaj demandis al ili: «Kien vi iras? kion vi povos fari sen armiloj?»

Serioze, kun firma decido, ili respondis «—Ni iras ankaŭ al tranĉeoj, ĉar certe kelkaj mortfalos. Tiam ni prenos la armilojn...

◆ ◆ ◆

Dum la unuaj semajnoj de l' milito oni luktis improvize; iom post iom kreskas forta k potenca organizo, entuziasma disciplino je la servo de popola registaro, jam donis fruktojn.

Jen epizodo, kiu pruvas ĉi supran aserton: En Asturia fronto k dum atako al Oviedo, grupo da milicanoj —naŭ soldatoj kun kaporalo—pro erara timo resti envolvitaj, forlasis strategian malgrandan pozicion. Ili estis tuj juĝataj k mortpunitaj.

Kiam ili sciiĝis pri la puno, unu el ili antaŭenpaŝis k diris: «Ni eraris, sed se vi pardonas nin, ni promesas rekapti, hodiaŭ mem, la forlasitan pozicion». Oni permesis al ili la plenumon de tiu celo, k dum vespero la dek soldatoj iniciatis la promesitan konkeron. Post tridek minutoj la pozicio denove estis en manoj de tiuj b avaj soldatoj, kiuj tiamaniere elmontris sian entuziasmon k disciplinon, momente forgesitaj pro konfuzo.


# Nia unua venko sur ebena kampo

Ni atingis nian unuan venkon sur ebenaĵo, apud vilaĝo Arganda kun milda horizonto de paŝtejo.

Atakoj, defendoj, marŝoj k kontraŭmarŝoj... sed ni perdis, tagon post tago, vilaĝojn, urbojn, montojn k valojn. Forta obsedo, la obsedo pri aeroplanoj k tankoj, dum la unuaj momentoj, semis malordon k nevenkeblan angoron inter niaj nespertaj milicanoj.

Ni militis senorde, improvize, kun malfidoj, kelkafoje ĝustaj sed alifoje neĝustaj. Mankis taŭga materialo, fidindaj teknikistoj k konkretaj planoj. Jen ĉagreno!

Kial malfruis tri monatojn la faŝistoj, en marŝo de Ekstremaduro ĝis Parko de Madrido? Ili estus povintaj kapti la ĉefurbon post kvinsemajna vojaĝo. Sed ili mal-




havis aŭdacon, iniciativon k atakemon; male, ili havis rutinon k malkuraĝon. Ili timis siajn proprajn venkojn, tiom facile akiritajn.

Plie, ili estis mallertaj ĉar preferis la sentimentalan celon de Toledo anstataŭ la praktikan k strategian celon de Madrido... k ili marŝis apud rivero Tajo anstataŭ marŝi per centra ŝoseo rekte al ĉefurbo.

Ili organizis en najbara vilaĝeto Leganés urbestraron por la ĉefurbo, kekajn muzikistarojn por festi la eniron k sep militajn tribunalojn en Segovia por organizi, laŭ leĝa aspekto, la venĝadon, ĝuado de dioj...

Sed kiam ili entreprenis la eniron, barikadoj k fusiloj konsistigis nedetrueblan barieron, antaŭ kiu la centroeŭropaj teknikistoj bruege fiaskis. Tiam ili haltis k meditis. Kion fari? Ĉu manovri por tranĉi komunikojn inter la urbo k montaro? Ĉu ataki laŭ Saŭer'a taktiko? Franko decidis lastan solvon.

Tiu kojna atako ankaŭ fiaskis, k oni sekvis, konsekvence, la unuan planon. Estis ĵus alvenintaj germanaj k italaj trupoj; kunigante ilin al maŭroj k legianoj, oni formis kelkajn densajn kolonojn ŝturmajn, kiuj atakis la sudokcidentan parton de Madrido celante rompi niajn liniojn inter la urbo k montaro Gvadaramo, kie ili povus kapti niajn milicanojn k provoki katastrofon.

Multenombra aviadilaro, potenca artilerio k granda kvanto da tankoj apogis la atakon, kiu progresis malrapide sed senhalte... ĝis kiam ili alvenis en plataĵon Las Rozas, pozicio praktike nedefendebla, kiu havis plej strangan garnizonon; la treege kurioza bataliono konsistanta el razistoj k viandistoj. Ili rezistis kiel veteranoj ĝis alveno de helpo k la batalo daŭris pli ol du semajnoj. La atakintoj perdis, laŭ ili mem, kvarmil soldatojn. Ili konkeris Las Rozas, Pozuelo k Aravaca, sed nenion plu. Tie ili estas ankoraŭ k nun estas niaj trupoj kiuj atakas brave k rekonkere.

Post la nova fiasko, intervenis la ambasadoro, vere milita gvidanto en faŝista zono, germana generalo *von* Faupel kiu devigis forlasi la antaŭan planon k starigi novan, pli ampleksan. Li elpensis vastan manovron per kiu oni devigos nin akcepti batalon sur ebena kampo k oni kaptus la vojon de Madrido al Valencio. Kaj oni tion serĉis. Generalo *von* Faupel, staba komandanto de german-ital-maŭr-irland-portugala armeo, abrupte atakis la zonon kie fluas riveroj Jarama k Tajuña. Li celis konkeri, pleje dum kvin tagoj, Arganda k Ciempozuelos, iri ĝis Alcalá de Henares, kuniĝi tie kun la kolono de faŝista generalo Moscardo, kiu venos el Sigüenza k tiamaniere tranĉi ĉian komunikilon de Madrido k venki la respublikan armeon de la centra sektoro, kiu estas la plej potenca k plej bone organizita el ĉiuj, kiuj defendas laŭleĝan reĝimon.

Tuj post komenco de tiu atako, la faŝistoj anoncis nepre tujan sukceson, eĉ pajaca generalo Kejpo anoncis per radiostacio Seviljo, ke antaŭ ol fino de Februaro, Madrido apartenos al faŝismo.

Sed la defendantoj de la ĉefurbo ne malkuraĝiĝis protio; alvenis helpantoj, oni koncentrigis artilerion, aeroplanoj intense laboris. Niaj trupoj rezistis la atakon k tuj kontraŭatakis.

Nia ofensivo plifortigis la moralon de niaj soldatoj k senmoraligis la faŝistojn. La popola armeo atakis la tranĉeojn de Faupel ne timante fusilpafojn, grenadojn nek mitralilojn; la faŝistoj sin defendis malfacile.

Ni gajnis nian unuan batalon sur ebena kampo, kontraŭ germanoj, italoj, maŭroj k legianoj, kontraŭ germana generalo k kontraŭ stabo veninta el Postdam...

## GENERALO FRANKO


**SUPERA ESTRO DE «NACIA» ARMEO**

Laŭ rigora statistiko, bone zorgita k kiu konsistas el detaloj k ciferoj kontrolataj, hispanaj ribeluloj ricevis jenan soldatan helpon: 78.000 maŭroj, 39.000 germanoj, 82.000 italoj k 12.000 irlandanoj, poloj, portugalanoj k aliaj.

Entute 211.000 «volontuloj» de la faŝistaj registaroj; tiuj ciferoj reprezentas nur la sendojn, alvenintaj en nia lando ĝis komenco de Marto. Ankoraŭ alvenas senhalte, sed pri novaj kvantoj ni raportos en taŭga momento.

Dume, nia popolo luktas k kontraŭstaras la atakon de tiuj kolosaj fortoj, k en Londono rondeto de gravuloj seriozmiene diskutas... atendante la pereon de digna popolo por akcepti rabon kiel normalan diplomatan fakton.

Malgraŭ tiu farso, kontraŭ tiu burleska horo, Hispanio staras k donas respondon per arogaj batoj.



# MOZAIKO

• Belgaj parlamentanoj ĵus vizitis la ĉefurbon k batalfronton; ili aperigis en gazetaro jenan noton:

«La kamaradoj Nevse k Van Eyudonck, senatanoj; Saint k Delsonck, deputitoj, salutas la nevenkeblan popolon de Madrido, kiu tiel heroe rezistas sangajn atakojn de internacia faŝismo. Pli ol iam ni estas konvinkitaj ke hispana lukto estas lukto por la paco k libero de tutmonda demokratio. Ni, belgaj parlamentanoj, promesas kunhelpi per niaj personaj klopodoj al urĝa k efika apogo al defendantoj de la libero en Hispanio.»

• Laŭ kelkaj italaj kaptitoj en Guadalajara, oni promesis pagi al serĝentoj ĉiutagan salajron de 100 ptoj. k al soldatoj 20 ptoj., sed ĝis nun ili enspezis neniom. Krom la perforto aŭ trompo, ili ricevis mokon.

• Anglaj ekleziuloj, A. S. Duncan Jones, Dean of Chichester; Francis Muderhill, Dean of Rochester, Henry Brinton, vizitis Hispanion por raporti pri la situacio. Ili publikigis longan k objektivan raporton per kiu ili sincere informas laŭ propra vidpunkto.

Ankaŭ ili raportas pri registara organizo por gardi artaĵojn k pri protestantaj diservoj, kiuj regule funkcias en Madrid k Valencio, pri la antiklerikala movado en nia lando, kiu ne agitas kontraŭ Dio nek kontraŭ religio sed krontraŭ klerikaluloj, kiuj ekspluatis la popolon. Fine ili montras sian simpation al hispana popolo.

• En Galizia regiono, post laborista malvenko, grandaj grupoj da laboristoj fuĝis al montaro kie ili rezistas ankoraŭ. Ĉiutage pligrandiĝas ĝia kvanto; ili okupas nealireblajn poziciojn k diversfoje senditaj trupoj ne sukcesis venki ilin.

Tiuj grupoj tranĉis komunikadon kun Portugalio tra tiu loko.

Eble baldaŭ niaj bravaj soldatoj povos helpi tiujn heroojn.

• Ĉiuj italaj kaptitoj — jam estas grandega kvanto da ili—deklaras ke oni anoncis al ili ke la trupoj marŝos al Abisenio, sed poste oni transportis ilin al Hispanio. Ĉiuj facile raportas pri la organizo de itala armeo, pri la estroj, pri la armiloj k pri la ricevitaj ordonoj. Tamen, Mussolini daŭre asertas ke li «ne intervenas».

• Faŝista gazeto «Diario Vasco» el San Sebastian anoncas la 11. Marto ke la provincestro eksigis pli ol du cent vilaĝajn instruistojn.

Tion oni faris post la eksigo de profesoroj en universitatoj k liceoj. Certe la faŝistoj komencas krei novan civilizon laŭ pli nova sistemo.

• Komandanto Luciano Antoni Silva, itala kaptito, inter alie deklaris ke per itala interveno en nia lando oni intencas starigi en Hispanio internacian faŝistan Ligon.

Eble estas tia la intenco, sed certe ili ne atingos tian filantropian celon, ĉar hispana popolo scias lukti k morti por eviti tion.

• Aliaj kaptitoj deklaris: «Oni anoncis al ni ke ni iras nur por partopreni filmon sed malgraŭ tio ni estis senditaj al Hispanio. Oni parolis al ni kontraŭ la hispanaj «ruĝuloj» sed nun ni konstatas, ke hispanoj estas samkiel ni, italoj, ili nin konsideris kiel fratojn. Kiam la aliaj italoj scios tion certe ili deziros veni kun ni.»

• Laŭ informoj el internacia gazetaro, generalo Franko interkonsentis kun Germanio la liveradon de 300.000 tunoj da fera mineralo ĉiujare dum 35 jaroj kiel pagon por milita materialo, kiun li nun ricevas. Certe Hitler ne faris bonan negocon ĉar la realigo de tia promeso neniam estos efektiva.

• Ni ricevas informon, laŭ kiu la arestitoj en italaj karceroj estas liberigitaj k senditaj al nia lando kiel «volontuloj». Ĉiuj estas senditaj al haveno Specia por enŝipiĝo k vojaĝo al Hispanio kie ili jam pliriĉiĝas la «naciistan»armeon de Franko.

• Nia registaro ordonis laŭleĝan rekrutigon k la alvoko sukcesis tiagrade ke la unua tago sin prezentis 85 % da viroj kalkulataj en la koncerna dekreto. Neniam okazis, eĉ dum normala situacio, tiel plena sukceso. Oni devas kalkuli ke tiuj, kiuj mankis jam luktas kiel volontuloj aŭ laboras en militaj industrioj.

## JEN PRUVO!

Ĉefa Oficejo de la Stabo

Arcos, la 15. Marto 1937 (15.ª jaro de Faŝista Erao). Numero 2759.

Celo: Telegramo de l' *Duce*.

Mi komunikas la sekvantan telegramon, kiun sendas la *Duce*: «Mi ricevas en ŝipo POLA, dum vojaĝo al Libia, la sciigojn pri la granda batalo, kiu okazas en direkto al Guadalajara. La incidentojn mi atentas kun firma kuraĝo, ĉar mi estas certa ke la impeto k obstino de niaj legianoj venkos la malamikan rezistadon. Frakasi la internaciajn fortojn estos grandvalora k politika sukceso. Sciigu la legianojn ke mi sekvas atente ilian lukton, kiu sendube finiĝos per la venko.— Mussolini.» La divizia generalo,

Manzini (Subskribita)

• La ribeluloj denove serĉas maŭrojn. Por aranĝi la aferon ili interkonsentis kun la granda viziro de Maroko Sidi Mohamed Ben Ali, kiu ricevis inviton por vojaĝi al Hispanio.

Li vizitis faŝistan zonon kie la militistoj festis lin k petis novajn sendojn de malfeliĉuloj

• Speciala poŝta oficejo funkcias en faŝista zono je la ekskluziva servo de italaj trupoj. Ĝi estas nomata: Speciala Poŝtoficejo numero 500 V-17, k ĝin regas leŭtenanto Bartolini Romano.

• La Internaciaj Brigadoj, kiuj tiel heroe luktas sur batalkampo kontraŭ la faŝismo, ne nur donas sian sangon, sed ankaŭ helpas ariergarde por la venko. Ĵus ili donacis al konsilantaro por defendo de Madrid, por la civila loĝantaro, gravan kvanton da nutraĵoj, laŭ ĉi suba listo: 80.000 kgj. da densigita lakto, 30.000 kgj. da sekaj legomoj, 20.000 kgj. da pizoj k 100.000 kgj. da viando. Tiun donacon konsistigis la ŝparoj faritaj de niaj internaciaj kamaradoj, kiuj batalas ne forgesante virinojn k infanojn.

**SPEGULO** sen makulo de via fervoro k de via subteno estas ĉiu paĝo de POPOLA FRONTO, kiel reflekto de la grado de via aktiva partopreno.

Monereto, sen celo en via poŝo, povas esti grafika argumento en nia gazeto! Kombino de vortoj povas esti baterio se vi donas municion!

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
53, Rue Brise-Pain
Poŝĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono ce hola. danoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)

